NIA PONTO

Grupo Esperantista
Barrencalle Barrena, 7- 1ª dekstre
E-48005-BILBAO (Hispanio)
Redaktas: J.Miguel García Iturrioz (tepgaitj@lg.ehu.es)
Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)
☎ 34-944.164.492
☎ portebla: 696.613.958
esperantobilbao@terra.com
TTT-ejo: http://www.geocities.com/esperantobilbao

Jar-kotizoj: Normala: 17 €. Speciala: 14 €. Familia: 30 €.
BBK-konto: 2095-0141-41-2218001550

NOVEMBRO/DECEMBRO 2003



De maldekstre, **Eduardo Larrouy** kaj **J. Miguel García** pozas kun **Sean O'riain** (Prezidanto de Esperanta Eŭrop-Unio), **Renato Corsetti** (Prezidanto de UEA), Marko Naoki Lins (responsulo de la Brusela Komunikad Centro) kaj nia portugala amiko, **Branco Paulo**.

INTERVJUO EN "RADIO POPULAR".

La 7an de oktobro, nia samideano **Eduardo Larrouy** estis intervjuata de Mari Carmen Navarro, fama ĵurnalistino de Bilbao, en "Radio Popular". Krom paroli pri la ĝenerala agado de nia E-asocio kaj ĝia centjara ekzisto, estis okazo por propagandi la organizadon de nova kurso kaj prezenti la venontjaran eŭropan kongreson. Kiel sciate, Mª Carmen Navarro estis tre aktiva esperantistino antaŭ multe da jaroj, precipe ene de HEJS, kiam ĝia sidejo troviĝis en Bilbao.

INTERVJUO EN "BILBO VISIÓN".

La 16an de Oktobro, Eduardo Larrouy kaj Jesús Miguel García estis intervjuataj en la loka televid-stacio "Bilbo Visión". Terese Mendiguren, juna kaj brila ĵurnalistino, demandis pri Esperanto en Bilbao kaj faris kvazaŭ teatraĵon, en kiu Jesús, staranta apud nigra tabulo, klarigis mallonge pri la traduko Esperanten de kelkaj vortoj.

La etoso estis ege gaja kaj afabla, kvazaŭ familia, tiel ke Terese, jam konata de ni pro aliaj intervjuoj, simpatias al nia lingvo.

KRISTNASKA LOTERIO / LOTERÍA DE NAVIDAD.

Jam estas pretaj, de antaŭ kelkaj semajnoj, la kvitancoj por ludi la tradician hispanan loterion, okaze de la kristnaskaj festotagoj. Ĉi jare, la numero ludata de ni estas **29.350** kaj, same kiel la pasintan jaron (la unuan kun la eŭra monunuo), ĉiu kvitanco kostos 3 eŭrojn, el kiuj, 50 centonoj restos kiel mondonaco al la E-Grupo.

Ya están listos los recibos de la lotería de Navidad. El número jugado es el ***29.350*** *y, al igual que el año pasado (primero con euros), cada billete costará 3 euros, de los cuales, 50 céntimos quedarán como donativo al Grupo.*

PAGO DE JARKOTIZOJ 2003 / *PAGO DE CUOTAS 2003.*

Se troviĝus ruĝa kruco maldekstre de tiu paragrafo, tio signifus ke vi ankoraŭ ne pagis vian jarkotizon por la jaro 2003. Se tiel estus, bonvolu, kiel eble plej rapide, enkontigi ĝin. Ege dankon. Kotizoj kaj konto troviĝas en la 1a paĝo de tiu-ĉi "Nia Ponto".

Si encuentras una cruz roja a la izquierda de estas líneas es porque aun no has pagado la cuota de socio correspondiente al año 2003. Si así fuera, por el buen funcionamiento del Grupo, te rogamos que lo hagas cuanto antes. Muchas gracias. Cuotas y cuenta en la BBK están escritas en la primera página de este "Nia Ponto".

TRE FELIĈAN NOVAN JARON 2004

EŬROPA KONGRESO EN BILBAO (aŭgusto 2004).

- La 31an de decembro finos aliĝperiodo kun speciala rabato. Profitu la okazon kaj aliĝu tuj.

- Dum Ĝenerala Kunveno, okazinta la 12an de septembro en nia sidejo, estis definitive nomumita la Loka Kongresa Komitato, kiu restas jene:

  - PREZIDANTO: J. Miguel García Iturrioz
  - SEKRETARIO: Eduardo Larrouy López
  - KASISTO: Sabin Orueta Mendia
  - KOMITATANO PRI PROPAGANDO EN ESPERANTIO: Lourdes Martínez
  - KOMITATANO PRI AMASKOMUNIKILOJ: Eduardo Larrouy / J.Miguel García
  - KOMITATANO PRI EKSKURSOJ: Teodoro Ibáñez Martín
  - KOMITATANO PRI TTT-ejo: Patxi de la Hoz Méndez
  - KOMITATANO PRI KULTURA PROGRAMO: Lourdes Martínez
  - KOMITATANO PRI KONGRESEJO: Augusto Casquero de la Cruz

  Kompreneble, ĉiu, kiu deziros labori, havos postenon en la LKK. La listo nek estas, nek estos fermita. Fakte, multaj aliaj proponis sin kiel helpantoj por konkretaj taskoj.

- Ne forgesu ke vi trovos freŝigitajn informojn informojn pri la kongreso en nia TTT-ejo:

  http://www.geocities.com/esperantobilbao/eue.htm

- Kaj ne forgesu la ret-adreson de la kongreso: esperantobilbao@terra.com

- La 30an de oktobro, Jesús M. García kaj Eduardo Larrouy havis rendevuon kun Koldo Narbaiza, Direktoro pri Turismo de la Bizkaia Provinca Gubernio por prezenti la kongreson kaj fari diversajn helpopetojn. Li promesis helpi, prenis nian petoliston kaj invitis nin havi novan rendevuon post iom da tempo.

- La 6an de novembro, Eduardo Larrouy kaj Jesús M. García havis rendevuon kun Mª Angeles Egaña, Direktorino pri Kulturo de la bilbaoa Magistrato por prezenti la kongreson kaj peti helpon pri diversaj programeroj. La impreso estis tre bona kaj ni pensas ke fruktodonos.

- Kun la sama celo, la 17an de novembro, ni havis rendevuon kun la Direktoro pri Kulturo de la Bizkaja Provinca Gubernio.

- La vojaĝagentejo "Viajes El Corte Inglés" estos kiu oficiale okupiĝos pri la rezervo de la hoteloj, do al kiu oni devas sendi rekte la mendojn. En januaro, ĉiu kongresano ricevos "duan bultenon" kun informoj pri la diversaj loĝ-eblecoj en Bilbao.



6a EŬROP-UNIA E-KONGRESO

Bilbao, 25 / 29 aŭgusto 2004

ALIĜILO Nro .....

(BONVOLU SKRIBI TAJPE AŬ PRESLITERE)

Familiaj nomoj .....

Antaŭnomo .....

Viro / Virino (Forstreku la nevalidan) Naskiĝdato (JJJJ/MM/TT): ...../...../.....

Profesio: .....

Adreso: .....

Urbo ..... Poŝtkodo: .....

Lando: ..... Telefona Nro.: .....

Retadreso: .....

Mi aliĝas al la 6a Esperanta Eŭrop-Unia Kongreso kaj sendas la jenan sumon kiel pago de mia kotizo, laŭ la kondiĉoj skribitaj dorse de tiu ĉi paĝo, pere de .....:

Kongreskotizo en kategorio ..... - ..... eŭroj

Kongresdonaco ..... eŭroj

Entute .... eŭroj

DATO: ..... SUBSKRIBO: .....

KONGRESKOTIZOJ

(Ĉiuj en eŭroj)

	Ĝis 2003/09/15		Ĝis 2003/12/31		Ĝis 2004/04/30		Post 2004/05/01	
Kategorioj	A	B	A	B	A	B	A	B
1	40	30	50	35	60	40	70	45
2	30	15	35	17	40	20	45	22
3	0	0	0	0	0	0	0	0

1. Individua kongresano.

2. Kunulo (Tiu, kiu loĝas samadrese kun aliĝinto, kiu pagas kotizon en 1).
   Junulo (Tiu, kiu naskiĝis post 1974/12/31).

3. Infano (Tiu, kiu naskiĝis post 1990/12/31).

A: Landoj apartenantaj al Eŭropa Unio antaŭ 2003/12/31 plus Norvegio, Svisio, Islando, Aŭstralio, Israelo, Japanio, Suda Koreio, Usono kaj Kanado.

B: Ĉiuj landoj escepte de tiuj menciitaj en A.

RIMARKOJ:

1. La koncernan kotizon vi povas sendi al konto nro. 2095-0141-45-2218001832, de la ŝparkaso Bilbao Bizkaia Kutxa (BBK).

2. Konstanta adreso: Grupo Esperantista (EEU-Kongreso)
   Barrencalle Barrena, 7-1 D
   48005-BILBAO
   HISPANIO

   Telefona nro.: 34-944164492 (aŭtomata respondilo)
   Portebla tel.: 34-696613958
   Retadreso: esperantobilbao@terra.com
   TTT-ejo: www.geocities.com/esperantobilbao

3. La kotizo ne estos repagebla, eĉ se la aliĝinto ne partoprenas la kongreson.

4. La aliĝilon oni pritraktos nur post ricevo de la koncerna pago.

ZAMENHOFA FESTO-TAGO.

Kiel tradicie, ankaŭ ĉi-jare ni kunigos por celebri la datrevenon de la naskiĝo de la kreinto de Esperanto, L.L. Zamenhof.

La kunveno okazos la **sabaton 20an de decembro, je la 19,30 h**. Post spektado de E-filmo, okazos mallonga prelego, kiu enkondukos nin al harmonia diskutado; samtempe, estos trafa okazo por renkonti malnovajn geamikojn.

Ni finos per komuna manĝado de tio, kion alportos la ĉeestantoj.

NO LO OLVIDES: *El sábado 20 de Diciembre, a las 19,30 h., nos reuniremos en el Grupo para celebrar el aniversario del nacimiento de L.L. Zamenhof. Después de ver una película en Esperanto y celebrar un debate, acabaremos, como siempre, alrededor de una mesa, bien surtida con la comida traída por los presentes.*



Jen la ĉi-jara loteri-bileto de la Grupo. Rapidiĝu aĉeti ĝin ĉar la pasintan jaron elĉerpiĝis kaj kelkaj homoj ne povis ludi. **La lasta vendo-tago estos la vendredo 12a de decembro**.

Este es el billete de lotería que jugamos este año. Date prisa en comprarlo pues el año pasado se acabaron y algunas personas se quedaron sin jugar. Naturalmente, no reservamos y ***el último día de venta va a ser el viernes 12 de Diciembre***.

La E-Grupo de Bilbao deziras tre feliĉajn festotagojn kaj fruktodonan novan jaron 2004 al vi ĉiuj